

LA SUNO HISPANA *



S-ro Pastro ANTONO GUINART,
Profesoro de fremdaj lingvoj en la Piaj Lernejoj
el Valencio.—Sekretario de H. S. p. p. de Esperanto.

ENHAVO: 1. Al niaj legantoj.—2. Pri la II^a Kongreso de Esperanto.—3. Du Tartarenoj (*A. Daudet* trad. *E. Bacquet*).—4. Sciigoj.—5. La Harpo (*Bacquer*, trad. *V. Inglada*).—6. Bibliografio.—7. Problemoj.—8. Korespondada fako.—9. Niaj vizitantoj.

Al niaj gelegantoj

Interkonsentite ke «La Suno Hispana» estu, de nun, proprejo de la Grupo Esperantista Valencia, estos redaktoroj de la revuo, ĉiam sub la direktado de S-ro Aŭgusto Jimenez Loira, tiuj, kiuj kunmetas la Direktantan Komitaton de la Grupo Valencia.

La nova Redakcio sendas fratajn salutojn al siaj gelegantoj.

A nuestros lectores

Habiendo convenido en que «La Suno Hispana» sea, desde hoy, propiedad del Grupo Esperantista de Valencia, serán redactores de la Revista, siempre bajo la dirección de D. Augusto Jiménez Loira, los que componen la Junta Directiva del Grupo de Valencia.

La nueva Redacción saluda fraternalmente á sus lectores.

Pri la II^a Kongreso de Esperanto (En Septembro 1906^a)

La Esperantista Kongreso, okazonta en Ĝenevo dum la venonta Septembro altiros en Svisujon multajn vizitantojn, kiuj, verŝajne, uzos tiun okazon por detale travojaĝi la landon. La plimulto el tiuj vizitantoj estos esperantistoj kaj dezirinde estus ke ili trovu, en ĉiuj svisaj lokoj, hotelojn, loĝejojn, restoraciojn, bazarojn, k. t. p., kies servistaro (aŭ almenaŭ parto el la servistaro) parolus Esperante, kaj kie la logantoj certe trovos la plej konatajn el la esperantaj gazetoj, gvidlibroj, poštarkojn, k. c.

Jam kelkaj hoteloj en la ĉirkaŭaĵo de Monto Blanka sciigis nin ke ili plenumas la supreditajn kondiĉojn.

Ni do esperas ke la hotelo—loĝejo—kaj restoracimastroj kaj ankaŭ la sindikatoj kaj komitatoj sin okupantaj pri la altiro de fremduloj uzos sian liberan tempon por lerni pro sia profito la lingvo de doktoro Zamenhof.

N. B.—Por ĉiuj aliigoj, kaj sciigoj; sin turnu al la redaktoro de «Esperantojurnalo», 10, rue Berbisey à Dijon (Côte d'Or) Francuo.

La iniciativo prenita de «Esperantojurnalo» estas tre utila kaj atendinda. Ni konsentos specialan rabaton pri abonoj kaj anoncoj al ĉiuj hoteloj, loĝejoj kaj restoracioj.

Sobre el II Congreso de Esperante (En Septiembre de 1906)

El Congreso esperantista que ha de celebrarse en Ginebra durante el próximo Septiembre atraerá á Suiza muchos visitantes que, probablemente, aprovecharán la ocasión para recorrer detalladamente el país. La mayoría de estos visitantes serán esperantistas, y sería de desear encuentren, en todos los lugares de Suiza, hoteles, alojamientos, restaurants, bazaros, etc., cuya servidumbre (ó al menos parte de la servidumbre) hablase Esperanto, y donde encontrasen seguramente las más conocidas revistas esperantistas, guías, postales, etc.

Ya algunos hoteles de los alrededores del Mont Blanc nos han comunicado que satisfacen las condiciones anotadas.

Esperamos, pues, que los dueños de hoteles, alojamientos y restaurants, y también los sindicatos y comités que se ocupan en atraer á los extranjeros, emplearán el tiempo libre en aprender, por su propio provecho, la lengua del doctor Zamenhof.

N. B.—Para noticias y datos dirigirse al redactor del «Esperanto-jurnal», 10, rue Berbisey a Dijon (Côte d'Or), Francia.

La iniciativa tomada por «Esperantojurnalo» es muy útil y digna de atención. Haremos una rebaja especial en abonos y anuncios á todos los hoteles, alojamientos y restaurants.

Du Tartarenoj Memorinda dialogo de Tartareno Kihoto kaj Tartareno Sanĉo.

Kun tia aventurema frenezo, tia dezirado al fortaj sentegoj, tia vojaĝema, kuradema furioso, tia diabla elĉenigaðo, kiel, per Dio, okazis, ke Tartareno de Taraskono neniam estis forlasinta Taraskonon?

Dos Tartarenos

Memorable diálogo de Tartareno-Quijote
y Tartareno-Sancho.

Con tal locura de inclinación á aventuras, tal continuo deseo de fuertes impresiones, tal tendencia á viajar, á ser furioso correntón, ese desencadenamiento del diablo, ¿cómo, por Dios, ocurrió que Tartareno de Tarascón, nunca había abandonado á Tarancón?

Ĉar tio estas certa. Gis la kvardekkvina jaro, kuragęga Tartareno ne estis eĉ unufoje dorminta ekster sia urbo. Li ne estis eĉ plenuminta tion faman vojaĝon en Marseill'on kiun ĉiu vera Provençano elpagas por si de sia plenaĝo. Apenaŭ li konis Beaucair'on, kaj tamen Beaucair'ne estas malproksima de Taraskono, ĉar sufice estas transiri la ponton. Ho ve! tiu diabla ponto tiel ofte estas forportita de ventegoj, ĝi estas tiel longa, tiel peza kaj tie Rodano havas tiom da larĝo, ke, per Dio, vi komprenas... Tartareno de Taraskono preferis la teron firman.

Necese ja estas konfesi al vi, ke estis ĉe nia heroo du naturoj ne konfuzebraj. «Mi sentas du homojn en mi, diris ia Patro de l'Eklezio.» Tion li estus vere dirinta pri Tartareno. La fama Taraskonano—niaj legantoj povis tion ekvidi—en si portis la animon de Don Kihoto, la saman heroon idealon, la saman frenezon pri romanaĵoj kaj grandaĵoj, sed malfeliĉe li ne havis la korpon de la glora junkro, tiun ostan kaj malgrasan korpon, tiun apenaŭan korpon, tiel malmulte impresebalan per la materia vivo, kapablan pasigi dudek noktojn ne malbukante la kirason, kaj kvardekok horojn per unu plenmano da rizo. La korpo de Tartareno, male, estis bonula-korpo, dikega, pezega, sentamega, tre delikata, tre plendema, plena je burĝaj apetitoj kaj hejmaj postuloj, la dikventra kaj mallonga korpo de l' senmorta Sanĉo Pansa.

Don Kihoto kaj Sanĉo Pansa en la sama homo! Vi komprenas kiel malbone ili devis kune mastrumadi! Kia batalado! Kia disserigado! Ho! Kia bela dialogo skribinda de Lukiano aŭ Sankta Evremond'o estus jena dialogo inter la ambaŭ Tartarenoj, Tartareno-Kihoto kaj Tartareno-Sanĉo!

Tartareno-Kihoto, eksitigante per la rakontoj de Gustav'o Aymard, kaj ekskriante: «Mi tuj foriros».

Tartareno-Sanĉo, nur pensante pri la reumatismoj kaj dirante: «Mi restas».

Porque ello es cierto. Hasta los cuarenta y cinco años, el valeroso Tartareno no había dormido ni una vez fuera de su pueblo. Ni siquiera había realizado el famoso viaje á Marsella con que todo verdadero provenzano contribuye al ser mayor de edad. Apenas conocía á Beaucair; y sin embargo, Beaucair no está lejos de Tarascón, porque basta atravesar el puente. ¡Oh!, ese diablo de puente se lo han llevado tantas veces los huracanes, es tan largo, tan pesado, y allí el Ródano tan ancho, que, ¡por Dios!, comprende usted... Tartareno de Tarascón prefirió la tierra firme.

Es necesario, desde luego, confesarle á usted, que en nuestro héroe había dos naturalezas inconfundibles. «Yo siento en mí dos hombres—dijo un Padre de la Iglesia» Eso verdaderamente se hubiera dicho respecto á Tartareno. El famoso Tarasconano—eso nuestros lectores habrán podido notarlo—llevaba en sí el alma de D. Quijote, el mismo héroe ideal, la misma locura respecto á grandes y cosas novelescas, pero desgraciadamente no tenía el cuerpo del glorioso hidalgo, aquél huesoso y flaco, cuerpo, aquel apenas cuerpo, tan poco impresionable por la vida material, capaz de pasar veinte noches sin desabrocharse la coraza y cuarenta horas con un puñado de arroz. El cuerpo de Tartareno, por el contrario: era cuerpo bondadoso, gordísimo, pesadísimo, sensualísimo, muy delicado, lleno de burgueses apetitos y caseros cuidados, el vientre grueso y el pequeño cuerpo del inmortal Sancho Panza.

¡D. Quijote y Sancho Panza en un mismo hombre! ¡Comprenda usted cuán mal deben hospedarse juntos! ¡Qué lucha! ¡Qué desgarramiento! ¡Oh, qué bello diálogo digno de ser escrito por Lukiano ó Saint-Evremond sería el diálogo siguiente entre ambos Tartarenos, Tartareno-Quijote y Tartareno-Sancho!

Tartareno-Quijote, excitado por los cuentos de Gustavo Aymard y exclamando: «Yo saldré enseguida».

Tartareno-Sancho, sólo pensando en los reumatismos y diciendo: «Yo me quedo».

Tartareno-Kihoto, tre ekcitate:
 «Kovriĝu je gloro, Tartareno!
 Tartareno-Sanĉo, kvietege:

«Tartareno, kovriĝu je flanelo!»
 Tartareno-Kihoto, pli kaj pli eksicata:
 «Ho! la bonaj dupafrifloj! ho! la ponardoj! la kaptoŝnuroj!»
 Tartareno-Sanĉo, pli kaj pli kviete:

«Ho! la bonaj trikitaj vestoj! la bonaj varmegaj genuvestoj! ho! la bonegaj ĉapetoj kun orelingoj.»

Tartareno-Kihoto, kolerante:
 «Hakilon! oni donu al mi hakilon!»
 Tartareno-Sanĉo, sonorigante por la servistino:

«Johanjo, mian ĉokoladon!»

Poste aperas Johanjo kun bonega ĉokolado, varma, rebrilanta, bonodora, kaj bongustaj anizaj panrostoj kiuj ridigas Tartarenon Sanĉon, sufokante la kriadon de Tartareno-Kihoto.

Tia maniere okazis, ke Tartareno de Taraskono estis neniam forlasinta Taraskonon.

Lau A. DAUDET.

(Tradukis E. BACQUET.)

Sciigoj

Kaŭze de eraraj opinioj, jus publikigitaj de kelkaj gazetoj, pri la rolo de la «Esperantista Centra Oficejo» la fondintoj de tiu Oficejo komunikas al ni la jenaj klarigojn por malaperigi ĉiujn mal-kompreniĝojn.

I. Ke la «Centra Oficejo» estas nur ejo, fondita kun la celo, «efektivigi unuecon kaj ordenon en la laboroj kaj agoj de la Lingva kaj Organiza komitatoj, sub la konstanta direktado, kontrolado kaj inspirado de D-ro Zamenhof» laŭ la esprimoj de la Cirkulero unua.

II. Por ke oni ne erare opiniu, ke la «Centra Oficejo» havas superregantan intencion, la fondintoj de tiu Oficejo, ne

Tartareno-Quijote, muy excitado:
 «¡Cubríos de gloria, Tartareno!»
 Tartareno-Sancho, con muchísima tranquilidad:

«Cúbrete de franela»

Tartareno-Quijote, con más y más excitación:

«¡Oh!, ¡los buenos rifles de dos cañones! ¡Oh!, ¡los puñales!, ¡los lazos!»

Tartareno-Sancho, más y más tranquilamente:

«¡Oh!, ¡las buenas ropas de punto!, ¡las buenas calentísimas rodilleras! ¡Oh!, ¡las magníficas gorritas con orejeras!»

Tartareno-Quijote, con cólera:

«¡Un hacha! ¡Dadme un hacha!»

Tartareno-Sancho, llamando á la criada con un timbre:

«¡Juanita, mi chocolate!»

Después aparece Juanita con un magnífico chocolate caliente, reluciente, de buen olor y sabrosas tostadas de pan anisadas que hacen reir á Tartareno-Sancho, sofocando los gritos de Tartareno Quijote.

De esta manera ocurrió que Tartareno de Tarascón nunca salió de Tarascón.

Noticias

A causa de equivocadas opiniones, publicadas por algunas revistas, sobre el papel de la «Oficina Central Esperantista», los fundadores de esta Oficina nos comunican las siguientes declaraciones para borrar torcidas interpretaciones:

I. Que la «Oficina Central» es solamente un local fundado con el fin de realizar la unidad y orden en los trabajos y obras de los Comités lingüístico y de organización, bajo la constante dirección, comprobación e inspiración del Dr. Zamenhof, según se expresa en la primera Circular.

II. Para que nadie crea equivocadamente que la «Oficina Central» tiene intención de dominar, los fundadores de

volis sin turni senpere al la esperantistaro, por ĝin informi pri ĝia fondo kaj pri ĝia programo; ili petis de la Organiza Komitato, ke ĝi parolu pri tio, je la nomo de la Oficejo, en siaj oficialaj cirkuleroj.

III. Ĉar la funkciado de la «Centra Oficejo» necesigas monon, kaj ĉar la fondintoj timas, ke ili ne povos ĉiam preni sur sin la tutan elpezon, ili pensis, por certe daŭrigi la ekziston de la fondajo, starigi, kun la helpo de esperantistoj, specialean societon de Amikoj de Esperanto, kiu finance subtenos la Oficejon, se oni opinios ke ĝi estas utila. Se, kiel ili esperas, la alvoko pri tio, de la Cirkulero tria, donas suficien nombron da unuaj aprobantoj, la fondintoj de la Oficejo sendos, konsente kun tiuj personoj, cirkuleron por kolekti la aliĝojn al tiu societo, kiu estos poste fundata, nur se tiuj aliĝoj estas suficie multaj.

Anglujo.—Ni tutkore salutas la aperon de nova kunbatalanto «La Esperanta Studento» ĉiumonata gazeto eldonata de la Brighton kaj Hove esperantista grupo kaj direktata de F.^{ino} Oxendorf. Ni varme gratulas la kuraĝegan samideaninon pro la sukceso de siaj klopodoj.

Laŭ la angla ĵurnalo «Daily News», la Edukada Konsilantaro jus akceptis kaj provizore aprobis Esperanton, kiel subtenindan. La sciigo officiale donita de la Registara Inspektoro al S-ro Rhodes estas vere tre grava.

Oni fondis esperantistajn grupojn en Hillhead, Airton Bell Busk, Bovey Tracey kaj Hull.

En Cambridge estas sukcese instruata lingvo al la policistoj kaj estas verata specia libro por policaj aferoj.

Bulgarujo.—Baldaŭ aperos nova ĵurnalo «Bulgara Esperantisto» bulgare kaj esperante redaktata, en granda ĵurnala formato kaj eliros 1-3 fojojn ĉiumonate laŭ la nombro de la abonintoj. La jar-

dicha Oficina no quisieron dirigirse directamente á los esperantistas para informarles sobre su fundación y su programa; ellos pidieron al Comité de organización que hablara sobre esto, en nombre de la Oficina, en sus circulares oficiales.

III. Puesto que el funcionamiento de la Oficina Central necesita dinero, y los fundadores temen no poder sobrelevar siempre todos los gastos, pensaron, para asegurar la existencia de la fundación, fundar con la ayuda de los esperantistas una sociedad especial de Amigos del Esperanto que sostuviera financieramente la Oficina, si se opinase que ella es de utilidad. Si, como esperan, el llamamiento que hizo sobre esto la tercera Circular da número suficiente de primeros aprobadores, los fundadores de la Oficina enviarán, con consentimiento de esas personas, una circular para recoger adhesiones á dicha sociedad, que se fundará posteriormente si las adhesiones son suficientes.

Inglaterra.—Saludamos cordialmente la aparición de un nuevo colega, «La Esperanta Studento», revista mensual publicada por el grupo esperantista de Brighton y Hove y dirigida por la señorita Oxendorf. Calurosamente felicitamos á la valerosa compañera por el éxito de sus trabajos.

Según el periódico inglés «Daily News», el Consejo de Educación acepta y aprueba provisionalmente el Esperanto como digno de apoyo. La noticia, dada oficialmente por el Inspector del Gobierno al Sr. Rhodes, es verdaderamente importante.

Se han fundado grupos esperantistas en Hillhead, Airton Bell Busk, Bovey Tracey y Hull.

En Cambridge se enseña con éxito nuestra lengua á los policías y se está escribiendo un libro especial sobre asuntos policiacos.

Bulgaria.—Pronto aparecerá un nuevo periódico, «Bulgara esperantisto», redactado en búlgaro y Esperanto, de gran tamaño, y saldrá de una á tres veces al mes, según el número de los suscriptores.

abono kostos 4 frankojn en fremlandoj.
Vin turnu al la Redakcio en Sofia.

Italujo.—Oni fondis grupon en Fi-
renzo.

Svedujo.—Laŭ letero kiun ni ricevis
el Stokolmo ekzistas grupoj esperantistaj
en Helsingborg, Goteborg, Eskilstuna,
Nyköping kaj Karlshamn.

Ni gratulas la Stokolman grupon pro
la eldono de nova kolego «Esperantisten»
lerte kaj bonstile redaktata en lingvoj
sveda kaj esperanta.

Hispanujo.—Dank'al la klopoj de
S-ro Eugenio Calvo, jus fondigis grupo
en Tarankon'o, kies direktanta komitato
estas la jena:

Honoraj prezidantoj, D-ro Zamenhof
kaj S-ro Ricardo Codorniu; prezidanto,
S-ro Eugenio Calvo; vicepresidente, S-ro
José Alvarez de Lara; sekretario, S-ro
Antonio Alonso; kaſisto, S-ro Joaquín
Herrera; bibliotekisto, S-ro Jacinto Ca-
ñete; voĉdonantoj: S-roj Felipe Rico,
Enrique Domínguez, José Rius, Antonio
Navarro, Jesús Bugeda, Gonzalo Martínez.

S-ro Eduardo Segarra, el Manresa,
sciigas nin ke la tiea grupo faras sukces-
plenan kurson en la «Asociación de De-
pendientes».

«El Correo Español», unu el la plej
gravaj journaloj en Hispanujo, en sia nu-
mero 5.160 la 22^a de Febrero lasta,
enpresis belan kaj longan artikolon pri
Esperanto. Ĝi laudas per fortaj argumen-
toj la grandegan utilacon kiun havas nia
lingvo internacia por la katolikoj, al kiuj
ĝi konsilas la lernardon kaj divastigon de
Esperanto. Ni tutkore dankas la redak-
cion de la dirita journalo pro ĝia bona
helpo en nia propaganda entrepreno.

Unu ero por la historio de Esperanto
en Hispanujo estas la jena: «La 6^a de
Febrero de 1906, Esperanto estis elpa-
rolata la unuan fojon de deputato sinjoro
Romeo en la nia nacia popola Ĉambro
kiun oni nomas ordinare Kongreso de la
Deputatoj».

Niaj kunbatalantoj el *Corunjo* sekvas

La suscripcio anual costarà 5 fr. en el ex-
tranjero. Dirigirse á la Redaccion en Sofia,

Italia.—Se ha fundado grupo en Fi-
renza.

Suecia.—Según carta recibida de Sto-
kolmo, existen grupos esperantistas en
Helsingborg, Goteborg, Eskilstuna, Ny-
köping y Karlshamn.

Felicitamos al grupo de Stokolmo por
la publicación del nuevo colega «Espe-
rantisten», redactado diestra y correcta-
mente en lengua sueca y esperanta.

España.—Gracias á los trabajos de
D. Eugenio Calvo se ha fundado un
grupo en Tarancón, cuya Junta Directiva
es la siguiente:

Presidentes honorarios: Dr. Zamenhof
y D. Ricardo Codorniu; presidente, don
Eugenio Calvo; vicepresidente, D. José
Alvarez de Lara; secretario, D. Antonio
Alonso; cajero, D. Joaquín Herrera; bi-
bliotecario, D. Jacinto Cañete; vocales:
D. Felipe Rico, D. Enrique Domínguez,
D. José Rius, D. Antonio Navarro, D. Je-
sús Bugeda y D. Gonzalo Martínez.

D. Eduardo Segarra, de Manresa, nos
participa que el grupo de allí da un curso
en la «Asociación de Dependientes» con
completo éxito.

«El Correo Español», uno de los más
importantes diarios de España, en su
núm. 5.160, el 22 de Febrero pasado
publicó un hermoso y largo artículo sobre
el Esperanto. Encomia con vigorosos ar-
gumentos la grandísima utilidad que tiene
nuestra lengua internacional para los ca-
tólicos, á quienes aconseja el estudio y
propagación del Esperanto. De todo co-
razón damos las gracias á la redacción del
citado diario por su buena ayuda en
nuestra empresa de propaganda.

Un dato para la historia del Espe-
ranto en España es el siguiente: El día 6
de Febrero del año 1906 la palabra
Esperanto fué pronunciada por vez pri-
mera por el diputado Sr. Romeo en
nuestra nacional Cámara popular, llama-
da ordinariamente Congreso de los dipu-
tados.

Nuestros colaboradores de *Coruña*

senlace ilian fervoran propagandon. Same klopodas por nia afero niaj samideanoj el *Santiago de Compostela*; por tio ĉi ili laŭdinde uzadas ĉiuj rimedojn. La lastan monaton ili enpresis en sia ĵurnalo «Gaceta de Galicia» leteron senditan de sinjoro Pastro Guinart al la Direkta Komitato de la tiea «Katalika Klubo de laboristoj». Tiu letero tre multe taŭgas por la divastigado de Esperanto inter katolikoj.

Antaŭ ne longe ni havis la plezuron ricevi viziton de S-ro Eladio Escudero, grava komercisto el Burgos kaj fervora esperantisto, kiu parolis al ni pri la granda entuziasmo kiun elvekis ĉe la tiea Komerca ĉambro nia bela lingvo, kaj pri la sukcesoj de la senlaca laborado de nia karega apostolo S-ro Manuel Esteban. Ni gratulas lin, ĉar li trafis enirigi Esperanton kien en aliaj ĉefurboj oni ankoraŭ ne povis trafi, t. e. en Komercan ĉambelon.

En Getafe, vilaĝo ne malproksime de la ĉefurbo Madrido, Esperanto elvekis grandan entuziasmon, laŭ diras al ni sinjoro Pastro Bragulat, el tieaj Piaj Skoloj.

siguen incansablemente su fervorosa propaganda. Igualmente trabajan por nuestra causa nuestros amigos de *Santiago de Compostela*; para esto emplean plausiblemente toda suerte de medios. El pasado mes publicaron en su diario «Gaceta de Galicia» una carta escrita por el Padre Guinart á la Junta Directiva del Círculo Católico de Obreros de allí. Esta carta es muy á propósito para la propaganda del Esperanto entre los católicos.

No hace mucho hemos tenido el gusto de recibir una visita del Sr. D. Eladio Escudero, comerciante de importancia de Burgos y fervoroso esperantista, el cual nos habló del gran entusiasmo que ha despertado en la Cámara de Comercio de allí nuestra hermosa lengua, y del éxito alcanzado por el incansable trabajo de nuestro queridísimo apóstol D. Manuel Esteban. Le damos el parabéén, pues ha conseguido introducir el Esperanto, donde en otras capitales no se ha podido todavía, es decir, en la Cámara de Comercio.

En Getafe, población no lejos de la capital, de Madrid, el Esperanto ha despertado gran entusiasmo, según nos dice el Padre Lorenzo Bragulat, de las Escuelas Pías de allí.

Al harpo

En salon' ĉe l'angulo malluma,
Forgesita kredeble de l' mastro,
Silentema kaj plena je polvo,
Kuſadis jen harpo.
Kiom multe da notoj dormadis
Sur kordar', kiel birdo sur branĉo,
Atendante lertegan sonigon
De blanka la mano!
Ho ve! Kiom da fojoj genio
En anima sinkaſa dormado,
Nur atendas la voĉon Lazaran
Ordonontan: «Leviĝon, formarson!»

Tradukis V. INGLADA.

Al arpa

Del salón en el ángulo obscuro,
De su dueño tal vez olvidada,
Silenciosa y cubierta de polvo
Veíase el arpa.
¡Cuánta nota dormía en sus cuerdas
Como el pájaro duerme en las ramas,
Esperando la mano de nieve
Que sabe arrancarlas!
¡Ay!, pensé, ¡cuántas veces el genio
Así duerme en el fondo del alma,
Y una voz como Lázaro, espera
Que le diga: «Levántate y anda!»

BECQUER.

Bibliografio

La Interrompita Kanto.—Romano de Eliza Orzeszko, esperantener tradukita kun permezo de la aŭtorino, de S-ro Kabe.—Librejo Hachette kaj K.^o Precio, 0⁷⁵ frankoj.

Preskaŭ senhalte ni ĵus tralegis, de ĉi komenco ĝis la fino, la belegan rakonto de Eliza Orzeszko, majstre tradukitan esperantener el la pola lingvo de S-ro Kabe. Ni ne ekintencas prezenti S-ron Kabe al niaj legantoj; li certe estas bone konata de ĉiu esperantisto, sed kvankam ĝi ne estus tia, nur tiu ĉi literatura traduko suficius por famigi lian nomon.

Ni jam konfesis ke ni legis la okdek-paĝojn de «La Interrompita Kanto» preskaŭ senhalte; ni varme rekomendas ĝin al niaj legantoj... kaj precipe al niaj legantindoj.

Bolesljo.—Rakonto de Maksim Gorjkij, tradukita de Ivan Seleznjov kaj eldonata de «Societo Espero» en Peterburgo.

Antaŭtempe jam publikigis firmo Montesinos, de Barcelono, tiun ĉi rakonton hispanen tradukitan. Sed ni devas konfesi ke la hispana traduko, eble fino de tradukada piligrimado tra la lingvoj germana kaj franca, prezantis al ni nur *ombron* de la Gorjkij'a verko; tion elmontras al la hispanaj esperantistoj la postmorta traduko esperanta de Ivan Seleznjoz. La komparo de ambaŭ tradukoj pruvas kion ni multfoje jam diris, t. e. ke la internacia lingvo ne nur taŭgas sed ankoraŭ estas necesa por disvasti kiel eble plej fidelajn tradukojn de la naciaj literaturaj verkoj.

Krom tiô, ni aldonu ke la rakonto de Maksim Gorjkij estasinda esti konata en la tutmondo.

Ni varme gratulas la Peterburgan Societon «Espero» por la eldonon de tiu belega broŝureto.

Tutmondaj Fajro-kutimoj.—Kolekto farita de H. W. Southcombe. Prezo: 35 centimoj.

Bibliografía

La interrompita kanto.—Novela de Eliza Orzeszko, traducida al Esperanto, con permiso de la autora, por el señor Kabe.—Librería Hachette y C.^a Precio, 0⁷⁵ francos.

Sin detención acabamos de leer, del principio al fin, la hermosa narración de Eliza Orzeszko, magistralmente traducida al Esperanto del polaco por el Sr. Kabe. No intentaríamos presentar el Sr. Kabe á nuestros lectores; ciertamente es bien conocido de todo esperantista; pero aunque así no fuese, solamente esta traducción literaria bastaría para hacer famoso su nombre.

Hemos confesado que leímos las 80 páginas de «La interrompita kanto» sin detención; calurosamente la recomendamos á nuestros lectores... y principalmente á nuestras lectoras.

Bolesljo.—Cuento de Máximo Gorki, traducido por Ivan Seleznjov y editado por la Sociedad «Espero» de Petersburgo.

Hace algún tiempo, la casa Montesinos, de Barcelona, publicó este cuento traducido al español. Pero debemos confesar que la traducción española, probablemente término de una peregrinación de traducciones á través de las lenguas alemana y francesa, nos presentó sólo una sombra de la obra de Gorki; esto demuestra á los esperantistas españoles la traducción póstuma de Ivan Seleznjov.

La comparación de ambas traducciones prueba lo que ya muchas veces hemos dicho, esto es, que la lengua internacional, no sólo sirve, sino que es necesaria para esparrir traducciones lo más fieles posible de las obras literarias nacionales.

A más de esto, añadimos que el cuento de Máximo Gorki es digno de ser conocido en todo el mundo.

Felicitamos calurosamente á la sociedad «Espero» de Petersburgo por la publicación de este hermoso folleto.

Tutmondaj Fajro-kutimoj.—Colección hecha por H. W. Southcombe.—Precio, 35 céntimos.

S-ro H. W. Southcombe prezentas en tiu ĉi brošureto kolekton da sciigoj pri fajro-kutimoj de diversaj landoj; tre korekte verkita kaj multinteresa, ĝi nur estas, laŭ diras la aŭtoro mem en ĝia antaŭparolo, la unua el serio da similaj brošuretoj priskribantaj kutimojn aŭ ceremoniojn en kiuj oni ekbruligas fajron.

Atendante la baldaŭan aperon de alia simila verketo, ni petas niajn legantojn, je la nomo de l'aŭtoro, ke ili sendu al li fajro-kutimajn sciigojn de iliaj landoj. Ilin sendu, do, al S-ro Southcombe, 15, The Park, Jeovil, Somerset, England.

Poŝlibro Internacia por aferistoj, turistoj, k. c., de Georgo Norman.—Librejo Hachette kaj K.^o Prezo: 2 frankoj.

Kiel montras ĝia titolo, ĝi estas intereseja por aferistoj, turistoj, k. c.

En ĝia unua parto estas gregoria kaj julia rapidega ĉiama kalendaro, alfarebla, en simpla kaj plena formo, al ĉiu jaro el la kristana tempkalkulo; en la dua, eŭropaj kaj nordamerikaj internaciaj egalecotabeloj (sur oficialaj fundamentoj) pri moneroj, pezoj kaj mezuroj kaj kutimaj komercaj prezoj.

La utileco de la verko faras ĝin vere rekondinda.

Sveda propaganda slosilo.—Sinjoro Ĉefec senĉese daŭrigas la publikigadon de siaj utilgeaj «Propagandaj Slosiloj» diverslingve verkitaj.

Jus aperis la sveda eldono, kiu, kiel la aliaj jam publikigitaj, estas ricevebla. po 3'50 frankoj la cento, de la eldonisto, kiu akceptas ĉiulandoj poštmarkoj laŭ efektiva valoro.

Ni gratulas nin pro la aperto de tiu nova propagandilo lerte uzota de niaj svedaj samideanoj.

Oficiala protokolaro de la Unua Kongreso universal de Esperanto en Boulogne-sur-Mer.—Parizo. Presa Esperantista Societo. Prezo, 30 centimoj.

En tiu ĉi brošureto restos officiale kolektitaj, la protokoloj de nia neforgesebla Kongreso.

El Sr. H. W. Southcombe presenta en este folleto una colección de noticias sobre costumbres de diversos países; correctamente escrito y de mucho interés, es sólo, según dice el mismo autor en el prólogo, el primero de una serie de folletos análogos describiendo costumbres ó ceremonias en las que se encienden fuegos.

Esperando la pronta aparición de otra obrilla semejante, pedimos á nuestros lectores, en nombre del autor, que le envíen noticias sobre tal clase de costumbres en sus países. Envíenlas á dicho Sr. Southcombe, 15 The Park, Jeovil, Somerset, England.

Poŝlibro internacia para negociantes, turistas, etc., por George Norman. —Librería Hachette y C.^a Precio, 2 francos.

Como indica su título, esta obra es interesantísima para negociantes, turistas, etc.

En su primera parte hay un rápido calendario perpetuo gregoriano y juliano, aplicable en simple y completa forma a todos los años de la era cristiana; en la segunda hay tablas de equivalencia internacionales de Europa y Norte-América (con datos oficiales) sobre monedas, pesos y medidas y precios comerciales más comunes.

La utilidad de la obra la hace verdaderamente recomendable.

Sveda propaganda slosilo.—El señor Ĉefec continúa la publicación de sus utilísimos «Propagandaj Slosiloj», traducidos á diversas lenguas.

Acaba de aparecer la edición sueca, que como las demás ya publicadas, pueden recibirse del editor á 3'50 francos el 100, aceptándose sellos de todos los países segú su efectivo valor.

Nos felicitamos por la aparición de este nuevo medio de propaganda que usarán diestramente nuestros compañeros suecos.

Actas oficiales del primer Congreso universal de Esperanto en Boulogne-sur-Mer.—París. Presa Esperantista Societo. Precio, 30 céntimos.

En este folleto quedarán coleccionadas oficialmente las actas de nuestro inolvidable Congreso.

Ni ne bezonas laŭdi la gravecon de la verko por ĉiu esperantista. Ĝi estas vere rekomendinda kaj ni ne dubas ke ĉiu el niaj legantoj gîn aĉetos kiel memoraĵo de la Boulogne'a Kongreso.

Familles des mots.—Etude de radicaux, suivie de règles précisant l'emploi de certains suffixes par le Dr. Paul Rodet, secrétaire général de Groupe médical esperantiste.—Parizo. Librejo Hachette kaj K.^o Prezo, o'80 frankoj.

Tiu ĉi verketo estas la plej evidenta pruvo pri la riĉeco de nia lingvo.

La aŭtoro prenas radikvorton kaj per helpo de prefiksoj kaj sufiksoj li kunmetas ĉiujn eblajn vortojn. La verko finiĝas por komentario pri la sufiksoj *aj*, *il*, *eble*, *ig*, difinante ilian uzon tiamaniere, ke oni ne povas dubi eĉ unu momenton pri la senco, kiun ili donas al la vortoj per ili kunmetitaj.

Hispana Farlibro esperantista por 1906.—Eldonita de la Hispana Societo p. p. Esperanto.—Presejo de Mikaelo Gimeno. Valencia. Prezo 25 centimoj.

Jus aperis tiu utiliga kaj kurioza libreto, nediskutebla pruvo de la efika propagando de niaj sampatruijanoj.

En ĝia antaŭparolo mirinde verkita de S-ro Ricardo Codorniu, la respektinda kaj neanstatauebla prezidanto de H. S., oni raportas la triumfojn atingitajn de la hispanaj esperantistoj dum la jaro 1905^a; kaj kelkaj kortušantaj vortoj pri la Kongreso de Boulogne rememorigas al ni la grandan helpon, kiun donis al nia propaganda la sukcesoj de la pasinta Aŭgusto.

La antaŭparolon sekvas la Regularo de la Societo, hispane redaktita kaj la protokolaro de la jaro 1905^a en esperanta lingvo. Poste, la nomaro de la anoj kaj tabelo de hispanaj provincoj ordigitaj laŭ nombro de societanoj; la adresaro de prezidentoj kaj sekretarioj de ĉiu hispana grupo, fine, ĝeneralaj nomaro de niaj esperantistaj sampatruijanoj.

La verko do, ne estas nur memoraĵo de niaj poresperantaj klopodoj, sed ankaŭ grava propagandilo, kiu montras al ĉiuj la vojon tra ritiran dum la pasinta jaro.

No necesitamos alabar la importancia de esta obra para cada esperantista; es digna de recomendación y no dudamos que nuestros lectores la adquirirán como recuerdo del Congreso de Boulogne.

Familles des mots.—Estudio de radicales, seguido de reglas explicando el empleo de ciertos sufijos, por el Dr. Paul Rodet, secretario general del Grupo médico esperantista.—París. Librería Hachette y C.^a Precio, o'80 francos.

Esta obra es la más evidente prueba de la riqueza de nuestra lengua.

El autor toma una raíz, y con ayuda de prefijos y sufijos compone todas las palabras posibles. La obra termina con un comentario sobre los sufijos *aj*, *il*, *ebl*, *ig*, señalando su uso de tal manera que no se puede dudar ni un momento sobre el sentido que dan á las palabras que con ellos se forman.

Anuario esperantista español para 1906.—Editado por la Hispana Societo p. p. Esperanto.—Imprenta de Miguel Gimeno. Valencia. Precio, 25 céntimos.

Acaba de publicarse este utilísimo y curioso librillo, indiscutible prueba de la eficaz propaganda de nuestros compatriotas.

En su prólogo, admirablemente escrito por D. Ricardo Codorníu, el respetable é insustituible presidente de H. S., se refieren los triunfos alcanzados por los esperantistas españoles en el año 1905, y algunas conmovedoras palabras sobre el Congreso de Boulogne nos recuerdan la gran ayuda que dieron á nuestra propaganda los éxitos del pasado Agosto.

Sigue al prólogo el Reglamento de la Sociedad, redactado en español, y las actas del año 1905 en lengua esperanta. Después la lista de los socios y un cuadro de las provincias españolas, ordenadas según el número de socios; las direcciones de los presidentes y secretarios de cada grupo español, y finalmente, la lista general de nuestros compatriotas esperantistas.

La obra, pues, no es solamente un recuerdo de nuestros trabajos por el Esperanto, sino también un importante medio de propaganda, que enseña á todos el camino recorrido durante el pasado año.

Eniris en nian Hispanan Societon dum la lasta monato la jenaj anoj:

El Toledo: 358, José Morales Vilar.—El Cabañal (Valencia): 359, José Font.—El Cardona: 360, F.^{ino} Sara Bofill.—El Burgos: 361, Eladio Escudero; 362, Roberto Escudero; 363, José de la Morena; 364, Miguel de Simón; 365, Teófilo Martínez; 366, Juan Jiménez Medina; 367, Cástulo Orejón; 368, Luis Gallardo; 369, Francisco Dorronsoro; 370, Mariano Gonzalo; 371, Francisco Mejorada; 372, Santiago Mira; 373, Emilio Veza; 374, Jaime Hilari; 375, Rafael Mejorada; 376, Germán Rodríguez; 377, Leopoldo Hernández; 378, Laureano Ruiz Collado; 379, Heliodoro Casado; 380, Luis de Corral; 381, Pablo Ubalde Luengo.—El Murcia: 382, José Martínez Orozco; 383, Enrique Lisboa Liébana; 384, Joaquín Cayuela de Isaura; 385, Francisco Sánchez Olmo; 386, Joaquín Alonso Ruiz; 387, Mariano Luján de Tejada; 388, José M.^a Alonso Lucas.—El Castellón: 389, José de Seijas Azafra.—El Monteagudo (Murcia): 390 osé Martínez Costa.—El Tarancón (Cuenca): 391, Eugenio Calvo Blasco; 392, José, Alvarez de Lara; 393, Antonio Alonso Guisasola; 394, Enrique Domínguez Hernández; 395, José M.^a Martínez Sarrión.

PROBLEMOJ

Solvoj de la problemoj prezentitaj en la antaŭa numero:

- I. Bato, dato, kato, rato, lato, mato, pato, sato, ŝato, vato.
- II. Homaro.
- III. Struto.

Ni ricevis ĝustan solvon de la I kaj III de S-ro J. Letenneur, el Parizo.

Korespondada fako de "La Suno Hispana,"

SINJOROJ:

N. M., Barcelona.—M. B., Alcoy.—E. C., Ocaña.—J. U., San Juan de Luz (Francujo).—Th. H., Ardsley House (Anglujo).—V. C., Manresa.—V. L., Manresa.—E. S., Manresa.—O. T., Manresa.—F. S., Enguera.—G. E., Bonne (Francujo).—L. E. Meser, Münchent (Germanujo).—G. L., Lyon (Francujo).—C. P., Mašon (Francujo).—C. D., Paris.—A. L. V., Murcia.—G. B., Barco de Valdeorras.—M. B., Murcia.—G. B., Murcia.—M. E., Burgos.—B. R., Tarrasa.—E. C., Tarancón (Cuenca).

Mi ricevis viajn abonpagojn. Dankon.

Kore salutas Vin,

A. J. L.

NIAJ VIZITANTOJ

- N.^o 26.—**Antaŭen Esperantistoj!!** Lartiga, 106, *Lima (Peruo)*. Jarabono, 3 frankoj.
- Jan. Feb. Marto 1906.—**Centramerikano Esperantista**. 8.^a Avenida Sur, 11, Cantón Libertad. Prezo, 0'12 \$ ekzemplero.
- 12 Nov 1905.—**El Dominical**. Marron a cuji, 43, Alto *Caracas (Venezuela)*. Jarabono, 6 pesetoj.
- 11 Feb. 1906.—**Esperanto**. Ceret, 4. Pir. Or. *Francujo*. 24 numeroj sinsekvaj, 3 fr. N.^oj 1, 2, 3 kaj 4.—**Esperanto**. *Falta (Rusujo)*. Jarabono, 8 fr.
- Jan. 1906.—**Esperanto**. Paphovelde-Utcza, 6, *Budapest*, 4. *Hungarujo*. Jarabono, 3 frankoj.
- N.^o 1, Feb. 1906.—**Esperanto**. S-ro N. D. Kovačev, Sofia (*Bulgarujo*). 24 numeroj sinsekvaj, 4 fr.
- Dec. 1905 Jan. 1906.—**Espero Katolika**. A Sainte Radegonde près *Tours (Indre et-Loire, Francujo)*. Jarabono, 2,50 fr.
- 4, II, 18 Dec. 1905.—**Espero Pacifista**. 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (*Francujo*). Jarabono, 5 fr.
- N.^o 4.—**Gefrataro Esperanta**. Napolio, Largo Gesu e Mario, n.^o 4. *Italujo*. Jarabono, 4 fr.
- Feb. 1906.—**Germana Esperantisto**. Prinzentrasse, 95, *Berlin S. (Germanujo)*. Jarabono 3 markoj.
- N. 3, II^a jaro.—**Holanda Pioniro**. *Hilversum, Holando*. Jarabono, 3 fr.
- Jan. 1906.—**Internacia Revuo Medicina**. 33, rue Lacépéde. Paris. Jarabono, 12 fr.
- N.^o 2 kaj 3, III^a jaro, 1905.—**Juna Esperantisto**. 9, avenue des Vollandes, *Genevo (Svisujo)*. Jarabono, 2 fr.
- 5 Feb. 1906.—**La Alĝeria Stelo**. 57, rue d'Isly, *Alĝer (Alĝerujo)*. Jarabono, 3 fr.
- Feb. 1906.—**La Belga Sonorilo**. S-ro J. Coox, Duffel, *Belgujo*. Jarabono, 4 fr.
- Sep.-Okt. 1905.—**La Meksika Lumturo**. Sta. Rosa, Necoxtla, Veracruz (*Meksi-kujo*). Jarabono, 3 fr.
- Feb. 1906.—**La Revue de l'Esperanto**, 26, rue Wissocq, *Boulogne-sur-Mer (Francujo)*. Prezo, 0'10 fr. ekzemplero.
- Feb. 1 kaj 15 1906.—**Lingvo Internacia**. 33, rue Lacepéde. Paris. Jarabono, 5 fr. Kun literatura aldono 7 fr. 50.
- 4, II, 18 Feb. 1906.—**Murcia**. Sociedad, 14, Murcia. Jarabono, 6 pesetoj.
- 1-16 Feb. 1906.—**Museo Exposición**. Medina, 37, *Alicante*. Jarabono, 5 pesetoj.
- Feb. 1906.—**Ruslanda Esperantisto**. S. Petersburgo, Bols. Podjaĉeskaja, 24 *Rusujo*. unu numero 30 kopekojn.
- Okt.-Nov.-Dec. 1905.—**Svisa Espero**. 6, vieux College, *Genéve (Svisujo)* Jarabono, 2,50 frankoj.
- Feb. 1906.—**The British Esperantist**. unuigita kun **The Esperantist**. 13, Arundel street, Strand. W. Q. *Londono*. Jarabono, 2 fr. Kun aldono literatura, 4 frankoj.
- Jan. 1906.—**Tra la Mondo**. 15, Boulevard des deux Gares, *Mendon (S. et O.) Francujo* Jarabono, 8 fr.
- Feb. 1906.—**Unua Pašo**. San Stefano, 26, Sofia, (*Bulgarujo*). Jarabono, 3 fr.